# DIA REGNO

* dumonata kristana revuo en esperanto * n-ro 3 (864) * 2007 *

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**
**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Claudiusweg 10,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- * Membro-subtenanto €30,- * Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- * pagante al Libroservo €18,- * Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. * Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI * Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

**DIA REGNO**
**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Storgatan 6 A; S 153 30 Järna; Svedio;
✆ +46 (70) 2004574;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický; Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Per aliaj okuloj | 51 |
| Manieroj esprimi amon | 53 |
| Labirinto | 54 |
| La nova kristanismo | 55 |
| Surĵetante sur Lin ĉian vian zorgon | 56 |
| Laŭlanda listo de aliĝintoj | 58 |
| Blinda sveda sciencisto doktoriĝis en la fako religio historia | 60 |
| La fiŝo kiel kristana simbolo | 61 |
| Financaj raportoj kaj klarigoj | 62 |
| Tagordo por la jarkunveno | 65 |
| Inventura saluto | 65 |
| Sekretaria jarraporto | 66 |
| Pri Esperanto-muzeo en Vieno | 68 |
| La bapto – simbolo de unueco | 69 |
| Informetoj | 70 |
| Nekrologoj | 71 |
| La tiel nomata "Jesuo-preĝo" | 72 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

La varmo alvenis ankaŭ al Svedio kaj plejmultaj jam planis sian libertempon somere. Ofte ni esperantistoj kaptas la eblecon renkontiĝi somere kun ali-naciaj konatuloj en diversaj kongresoj kaj kunvenoj. Simile ĉi-somere. Ni KELI-anoj havas ekz. la eblecon kongresi en Pollando. Laŭ la listo 189 personoj jam aliĝis. Ĉu ankaŭ vi? Se vi ne venos al Pollando, eble vi trovos alian eblecon paroli kun esperantistoj. Mia fratino nun eklernas Esp-on kaj mi vidas klare la bezonon praktiki. Malfacile evoluas la lernado se oni ne sufiĉe ofte praktikas la lingvon. Nuntempe eblas pli/malpli senpage kaj facile paroli mondvaste per komputiloj. Do kaptu iun okazon al internaciaj kontaktoj!

# Per aliaj okuloj

Jacques TUINDER, NL

La blinda germanino Sabriye Tenberken (36) kaj ŝia nederlanda vivkunulo Paul Kronenberg (38) fondis antaŭ naŭ jaroj en la Tibetlanda ĉefurbo Lhasa lernejon por vidhandikapitaj infanoj. Ilia organizaĵo nuntempe ĝuas mondvastan atenton pro novaj ideoj kaj iniciatoj.

La Ruĝa Kruco kaj aliaj bonreputaciaj helporganizaĵoj malakceptis ŝin kiam Sabriye Tenberken anoncis sin por dezirata laborloko. Kion faru homo kia estas vi eksterlande? Oni al ŝi konsilis sekvi vojon al la profesio de telefonistino. Dek jarojn poste Sabriye, pri kies meritoj mi plurfoje trumpetis, ĉefis la porblindulan organizaĵon BRAJLO SEN LIMOJ en Tibetlando. Menciinde estas ke ŝi iniciatis konstrui en Suda Hindio eduk-instruejon por homoj vidhandikapitaj.

Antaŭ nelonge Sabriye gastis en la populara televidprogramo de Oprah Winfrey, dum kiu oni ŝin kandidatis por la Nobelpremio por la Paco. Cetere, post Nelson Mandela, Jimmy Carter, enmaniĝis al ŝi la Distingilo Patrino Tereza. Kune kun sia partnero ŝi kavaliriĝis en Nederlando. La gazeto TIME elvokis ŝin 'Heroino de la Jaro 2004'.

Sabriye tute ne konsideris sin mem heroino. "Ŝi estas blinda, sed neniam sentis sin viktimo", iam diris Paul. Ŝi sekvis sian propran vojon. En la aĝo de 12 jaroj ŝi pro retina malsano blindiĝis. Sukcese ŝi trapasis la gimnazion kaj dum sia studenta tempo revis pri fremdaj lingvoj, vojaĝado, verkado kaj realigado de projektoj en foraj landoj.

Mokridado pri tiuj revoj flanke de samklasanoj stimulis ŝin eĉ pli obstine labori pri siaj ideoj kaj planoj. Ŝi finfine decidis entrepreni evoluhelpan taskon. Pri ĉio ĉi ŝi parolas en sia libro PER ALIAJ OKULOJ, kiu nepre aperu ankaŭ en Esperanto.

Kiam ŝi en iu tago vizitis ekspozicion pri la historio de Tibeto, ŝi certe sciis kion fari. Ŝi ekstudis centro-aziajn sciencojn kun Tibetologio kiel specialismo. Poste ŝi adaptis la brajloskribon al la Tibeta lingvo. Kun ĉi tiu valora spirita pakaĵo en sia kofro ŝi antaŭ deko da jaroj kun akompananto ĉevale vagis tra Tibeto. Tie ŝi renkontis multe da samsortanoj, kio gvidis al la decido iniciati propran porblindulan projekton. Pri tio ŝi rakontas en sia libro MIA VOJO KONDUKAS AL TIBETLANDO. *"Min ŝokis ĉio kion mi renkontis. Tiel mi vidis en izolita vilaĝo kvarjaraĝan blindan knabinon, al kiu la gepatroj neniam instruis uzi ŝiajn piedojn, ĉar ŝi tage kaj nokte restis ŝnurita al la lito. En aliaj vilaĝoj oni forkaŝis blindajn infanojn antaŭ la okuloj de la najbaroj; ili ne pli ol nur iomete vegetis en mallumaj kabanaĉoj."*



Dum sia Tibet-vojaĝo Sabriye ren-

kontis en gastejo sian fidelan venontan vivkunulon Paul; li estas lerta profesia teknikisto kiu tiam dorsosake pilgrimis de loko al loko. Iliaj ideoj sufiĉe paralelis. La realigado de instituto por vidhandikapitaj infanoj, komence, ne estis simpla tasko por unu sola blinda eksterlanda virino. Finfine ŝi ricevis permeson de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj de la Aŭtonoma Regiono Tibeto. Kiam Sabriye volis forvojaĝi el Bonn, ŝi havis telefonan interparolon kun Paul. Rezulte, li adiaŭis sian laborlokon kaj ligis sian vivodestinon al la ŝia. Kelkajn tagojn poste ili komune flugis Tibeton...

La duopo dume savis centojn da Tibetaj infanoj de senperspektiva estonteco. La porblindula lernejo en Lhasa estas sukceso. La infanoj, kiuj ekspertas kiom valora estas ilia vivo, evoluigas memfidon, kio ebligas pli bonan akceptadon fare de la socio. *"Al blinduloj vidantoj surmetas limigojn. Mi opinias, ke ni blinduloj estas eĉ en avantaĝa pozicio. Ni devas esti inventemaj kaj kreivaj, do devas uzi aliajn sensojn anstataŭ niaj okuloj. Savante infanojn el ilia izoliteco, mi donas al ili instrumentojn por fari la vivon pli bela kaj riĉa. Ni instruas al la infanoj, ke ili pripensu mem la plej bonajn solvojn por siaj problemoj."*

Laŭ oficialaj statistikoj Tibeto havus 35.000 registritajn blindulojn, sed la vera nombro estas multe pli alta. Grava faktoro komplikigas la situacion, ĉar laŭ la Budhisma religio blindaj homoj estas punitaj pro siaj pekoj en pasinta vivo. Pri tio hontas la parencoj! Blindeco kaj stulteco kvazaŭ sinonimas! Pere de sia lernejo blindaj infanoj sin mem integrigas en la socion. La lernantoj alpropigas al si la Tibetan brajloskribon adaptitan de Sabriye, lernas la anglan kaj ĉiĉeronas turistojn en la urbo. Apud la lernejo troviĝas brajlopresejo, edukejo por estontaj masaĝistoj kaj integriga projekto. Malproksime de la urbo estiĝis farmbieno, kie blinduloj povas trejniĝi por agrikultura laboro. Ili lernas produkti fromaĝon kaj kulturi florojn, legomojn, ktp.

Sabriye kaj Paul precipe dum la malvarmegaj Tibetaj vintromonatoj travojaĝas la mondon por serĉi sponsorojn, kiuj finance subtenu iliajn diversajn projektojn. Tio ne estas facila tasko, kaj havante samajn spertojn, pri tio mi plene samopinias. *"Multaj ŝatas aŭskulti niajn rakontojn, sed tio ne signifas ke malfermiĝas monujoj!"*, ofte diras Paul.

Grava fonto de enspezoj estas la libroj, kiujn verkis Sabriye. Nun ili en pluraj urboj kaj vilaĝoj atentigas homojn pri la jam menciita libro PER ALIAJ OKULOJ.

Post iom da tempo la du fondintoj de BRAJLO SEN LIMOJ intencas malfermi internacian edukejon en Kerala, Suda Hindio, destinita por vidhandikapitaj plenkreskuloj el la tuta mondo, sed unuaa loke el landoj kun malforta ekonomio. Multe da helpo, morala sed nelaste ankaŭ financa, ili spertis de Navin Ramachandran, hindo, loĝanta en Usono.

Konklude mi donu la parolon al Sabriye: *"En grandaj partoj de la mondo ankoraŭ ĉiam multaj blindaj infanoj ne povas frekventi lernejon. Tion ni intencas nepre ŝanĝi. Tial ni komencos internacian edukejon, kiu iom post iom malfermu novan mondon antaŭ miloj da blindaj homoj."*

# Manieroj esprimi amon

MU Binghua, Ĉinio

Foje, kiam en Pekino mi vizitis la kurson pri homaneco, nia instruisto skribis sur nigran tabulon la temon "Manieroj esprimi amon", por ke ni kursanoj kune diskutu pri ĝi. La instruisto petis ĉiun el ni eldiri almenaŭ unuspecan manieron kaj samtempe emfazis, ke ni ne ripetu tian, jam diritan de alia diskutanto.

Niaj respondoj estis diversspecaj. Iuj diris, ke oni povas per indulgemo esprimi sian amon; aliaj proponis, ke freŝaj floroj kaj afablaj vortoj plej ofte montras nian amon al niaj karuloj; kaj triaj opiniis, ke, ekzemple, kiam ia sufero falis sur nin, iu el ni preferas sole sin ŝarĝi per ĝi, sed kiam feliĉo kaj ĝojo alvenis al ni, tiu tamen elkore volas partoprenigi siajn amatojn, kaj tio estas la plej bona esprima maniero de amo. La diskuto estis daŭre vigla kaj plue varmigis ĉiujn kapojn.

Estis la vico de iu mezaĝa virino paroli. Ŝi rakontis al ni la jenan historion:

*"Kelkdek jarojn antaŭe, vivis paro da junaj geedzoj. Ambaŭ estis biologoj kaj tre amis unu la alian. Ili ofte kune eniris profunden en sovaĝan arbaregon por esplorado.*

*Iun tagon, kiel kutime, ili penetris ĝis la centra regiono de la primitiva arbaro. Sed, apenaŭ ili grimpis trans la montdeklivon konitan, ili tuj miregis, — ĉar ili rimarkis, ke renkonte al ili paŝas unu tigro. Tiam ili ne portis ĉasistan pafilon, kaj tute neeblis por ili ankaŭ forkuri.*

*Ili estis palaj kaj ne povis fari eĉ moveton. Ankaŭ la tigro staris firme kontraŭ ili. Rifuzi cedi restis nur malpli ol unu - du minutoj. La tigro iris rekte al ili, tuj poste ekkuretis, rapide pli kaj pli. Ĝuste en tiu ĉi momento, la viro subite ekkriis kaj tuj forkuris de la tigro fulmrapide, ne havante intencon por zorgi sian virinon. Estis strange, ke la tigro, kiu jam alproksimiĝis al la virino kaj estis tuj antaŭ ŝi, neatendite ŝanĝis sian atakan direkton. Ĝi turnis sin al la viro kaj postkuris lin. Baldaŭ aŭdiĝis doloraj krioj, kaj la viro jam servis al la tigro kiel nutraĵo, dume la virino tamen sendanĝere forsavis sin kaj konfuze revenis el la arbaro."*

Tiutempe, preskaŭ ĉiuj aŭskultantoj unuvoĉe riproĉis la viron en la nekredebla rakonto, ĉar, kiam okazis danĝero, li forlasis sian edzinon. En la riproĉado la mezaĝa virino, kiel la rakontinto, tamen faris demandon al ni, ĉu ni scias, kion la viro kriis okaze de la viv-danĝero.

La demando ne estis malfacila. La kursanoj facile respondis ĝin. Sume aperis nur du klasifikoj rilate ĉiuj diritaj respondoj. Ili estis, ke "Edzino, pardonu!" kaj ke "Rapide forkuru! Estas pli bone, unu forkuri!"

Sed la mezaĝa virino kun bedaŭro faris korekton, dirante: "Vi ĉiuj eraras! Tiu viro kriis al sia edzino: 'Bone zorg

nian filineton! Bone vivu!' La viro ja intencis forkonduki la tigron per sia ago". Ni vidis ke larmoj staras en ŝiaj okuloj.

Trovinte, ke ni ĉiuj iome surpriziĝas kaj ne komprenis, ŝi sekve klarigis. "En tia okazo, laŭ biologia scio, tigro absolute atakas tiun, kiu intencas forkuri, kio estas karaktero de tigroj." laste ŝi aldonis: "Ĉe la plej danĝera momento, mia patro sola forkuris, sed li per tia ĉi maniero esprimis sian sinceran amon al mia patrino..."

En la kurso regis portempa silento. Nia instruisto montris rideton al la mezaĝa virino kaj nia tondro de aplaŭdoj eksonis tra nia kurso pri homaneco.

# Labirinto

Siegfried KRÜGER, DE

De 16-a ĝis 20-a de aprilo okazis en la monaĥejo Kirchberg en Germanio ADORU-seminario. Kirchberg estas nun ekumena seminariejo en iama monaĥejo.

En 2006 oni konstruis tie sur herbejo labirinton, simila al tiu de Chartres (Francio, 1206). Ĝi servas je meditado.

La diametro de la labirinto estas 20 metroj. Sur 11 paralelaj cirklaj vojoj oni trapasas 28 vojkurbiĝojn ĝis la celo post 350 m estas atingita. La meditanto ĉirkaŭas survoje al la centro plurfoje la celon. Li kelkfoje estas devigata sekvi direktojn, kiuj ŝajnas gvidi for de la celo. Sed restante sur la vojo sen reiro, li atingos sur la vojo la centron. Por mezepokaj kristanoj labirinto estis parabolo de la homa vivo kun ties ekzamenoj, kromvojoj, restadoj kaj malfacilaĵoj, dum en la mezo, la celo, la ĉiela Jerusalemo atendis lin. Kredantoj povis per labirinto spirite postplenumi pilgrimadon.



Chartres (1216) 294 m longa
Kirchberg, (2006) 350 m longa

# La nova kristanismo

## La evoluo de kristanaj komunumoj

Jerald VEIT , Usono

En 2050 la plej grandaj kristanaj komunumoj estos ekster Eŭropo

Philip Jenkins, profesoro pri historio kaj religiaj studoj ĉe Pensilvania Ŝtata Universitato en Usono, asertas en sia libro “La Venonta Kristanismo” (angle: The Next Christendom*), ke en la jaro 2050 la plej grandaj kristanaj komunumoj de la mondo troviĝos en evoluantaj kaj ekstereŭropaj landoj. Lia analizo baziĝas parte sur statistikoj kaj prognozoj de la usona registaro pri la evoluo de la monda loĝantaro dum la unua duono de la 21a jarcento.

Laŭ tiu analizo, el la eŭropaj landoj nur Germanio restos en 2050 inter la dek plej grandaj “kristanaj” landoj de la mondo. Landoj kiel ekzemple Britio, Francio kaj Italio eĉ ne plu aperos sur la listo. Dum la intereso pri kristanismo en la tradiciaj kristanecaj landoj de la tiel nomata “Nordo” malkreskas, en la “sudaj” landoj ekzemple Latina Ameriko kaj Afriko la nombro de kristanaj adeptoj rapide kreskas.

Profesoro Jenkins skribas en sia libro, ke tiu venonta translokiĝo de la gravaj centroj de la kristanismo al la Sudo kaŭzos signifajn teologiajn ŝanĝojn. La kristanoj de la Sudo ĝenerale estas pli konservativaj kaj pli tradiciaj ol tiuj de Eŭropo aŭ Norda Ameriko, kaj ili ofte komprenas la Biblion pli laŭvorte kaj fundamentalisme ol la nordaj kristanoj.

Laŭ Jenkins la norda kristanismo, kun sia longtempa emfazo pri sociaj demandoj kaj liberala teologio, ankoraŭ ne bone komprenas la sudajn kristanojn kaj emas flankenpuŝi ilin, se ĝi ne tute forlasas ilin el la interkomprena diskuto.

La plej grandaj kristanaj komunumoj en la jaro 2050 (milionoj da kristanaj loĝantoj)

| | | |
|---|---|---|
| 1 | Usono | 330 |
| 2 | Brazilo | 195 |
| 3 | Meksikio | 145 |
| 4 | Filipinoj | 145 |
| 5 | Niĝerio | 123 |
| 6 | DR Kongo | 121 |
| 7 | Etiopio | 79 |
| 8 | Rusio | 80 |
| 9 | Ĉinio | 60 |
| 10 | Germanio | 57 |

(* The Next Christendom: The Coming of Global Christianity, Philip Jenkins, Oxford University Press, 2002)

# ...surĵetante sur Lin ĉian vian zorgon, ĉar Li zorgas pri vi

1 Petro 5:7

Elmer ESCOTO

Foje kelkaj kristanoj, legante tiun ĉi tekston, konfuziĝas, ĉar ili iam aŭdis, ke en Kristo estas nenia zorgo. Ili venis al Kristo ĉar ili eble aŭskultis predikon kie la predikinto promesis, ke en Kristo ĉiuj problemoj malaperos, ke oni ne plu suferos, ke oni estos por ĉiam libera je zorgoj.

Nu, tio estas parte vere. Estas vere ne ĉar ni neniam havos zorgojn, sed ĉar ni rajtas surĵeti la zorgojn sur Lin.

Jesuo mem diris, ke ni havos zorgojn, suferadon: Johano 16:33 *Tion mi parolis al vi, por ke en mi vi havu pacon. En la mondo vi havos suferadon; sed kuraĝu; mi venkis la mondon.*

Sed la Dia promeso validas: Psalmo 34:19 *Multaj estas la suferoj de piulo; Sed de ĉiuj la Eternulo lin savas.*

Kiajn zorgojn ni havas? Ni povas trovi tri kategoriojn

Luko 21:34 zorgoj pri vivrimedoj, manĝaĵo, trinkaĵo, vestaĵo, loĝejo... ni zorgas pri tio. Same instruis Jesuo en Mateo ĉapitro 6.

1 Kor 7:32-34 zorgo pri nia familio, edz(in)o, gefiloj, gepatroj...

Ĉiuj homoj zorgas pri tiaj aferoj, ĉu la homo estas kristano aŭ ne.

Sed la tria kategorio efikas nur je kristanoj: 2 Kor 11:28 zorgado pri ĉiuj eklezioj. Ĉu ni estas pastroj, pastoroj, episkopoj, helpantoj, instruistoj, ktp., ni havos zorgon: Ĉu mia instruado estas bona? Ĉu la grego lernos ion novan? Ĉu mi kiel direktoro de la laŭdado kaj adorado atingos la celon venigi la popolon en la Dian ĉeeston? Ĉu mi kiel pastoro bone zorgas pri ŝafidoj? Ĉu la ŝafidoj ricevas bonan manĝon, nome, bonan Vorton?

La zorgoj povas esti kelkfoje tro pezaj kaj malhelpaj al nia kurado (laŭ Hebreoj 12:1). Kion do ni faru?

Jen la respondo: Filipianoj 4:6-7 *Pri nenio trozorgu; sed pri ĉio, per preĝo kaj peto kun dankesprimo, viaj deziroj sciiĝu al Dio. Kaj la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardos viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo.*

Ni rimarku la uzadon de du absolutaj vortoj: “nenio” kaj “ĉio”. “Nenio”. Pri nenio trozorgu. Eĉ ne pri la manĝo, nek pri la bonfarto de la familio, nek pri la efiko de nia kristana laboro. Pri nenio! Tio ne implicas, ke ni laboru malbone, sed ke ni laboru sen pezaj zorgo aŭ sufero.

“Ĉio”. En ĉio Li helpos. Ne estas escepto.

Rimarku ankaŭ 4 vortojn kiuj direktas nin en preĝo:

## PREĜO – PETO – DANK-ESPRIMO – DEZIROJ

**Preĝo** – Eble ĉi tie la Sinjoro diras nur “preĝu!” (1 Tes 5:17)

**Peto** - Ĉi tie la ideo estas peti kvazaŭ ni estus almozuloj. Ne en la senso de

povreco, aŭ nedigneco. Sed almozulo ne hontas peti. Almozulo scias, ke se li ne petas, li ne ricevos. Almozulo ne fidas al si mem. Kaj tia devus esti nia sinteno. Ni mem ne kapablas elteni la zorgojn, do ni petu al Tiu, Kiu kapablas.

**Dankesprimo** - Foje (mi kunsentas) estas tre malfacile dankesprimi, aparte kiam oni trairas grandan zorgon. Sed en tiuj momentoj ni memoru ĉion, kion Dio jam faris por ni. Li donis al ni vivon. Ne nur biologian vivon, sed Lian Vivon Eternan. Li jam pardonis niajn pekojn en Jesuo. Kaj se ni ne memoras pri io kion Dio jam faris por ni, ni legu la Psalmon 77. Estas mirinde kiom la Spirito memorigos al ni!

**Deziroj** - Nun estas bona momento por esprimi al Dio niajn dezirojn: post dankesprimo. Dio ŝatas dankesprimojn, kaj Li konas niajn korojn, ĉu ni estas dankemaj. Memoru tiun ĉi pecon da historio: Luko 17:12-18 - *Kaj kiam ili eniris en unu vilaĝon, renkontis lin dek lepruloj, kiuj staris malproksime; kaj ili levis sian voĉon, dirante: Jesuo, estro, kompatu nin. Kaj vidinte ilin, li diris al ili: Iru, kaj montru vin al la pastroj. Kaj dum ili iris, ili fariĝis puraj. Kaj unu el ili, vidinte, ke li resaniĝis, revenis, glorante Dion per laŭta voĉo, kaj falis sur sian vizaĝon ĉe liaj piedoj kaj dankis lin; kaj li estis Samariano. Kaj Jesuo responde diris: Ĉu ne la dek estis purigitaj? sed kie estas la naŭ? Ĉu ne troviĝis revenantoj, por doni gloron al Dio, krom ĉi tiu fremdulo?*

Kaj Romanoj 1:21 – *ĉar konante Dion, ili ne gloris Lin kiel Dion, nek estis dankemaj, sed vaniĝis per diskutadoj, kaj ilia sensaĝa koro mallumiĝis.*

Estas do grave, ke ni estu dankemaj.

Kaj la promeso estas, ke *"la paco de Dio, kiu superas ĉian intelekton, gardos viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo"*.

Ni do dum momento memoru pri tio, kio estas tiom peza en niaj vivoj, ke ni ne ĝuas la vivon. Ni memoru pri tio, kion ni volas ĵeti sur Lin, ke Li portu la ŝarĝon, kaj ke nin invadu la paco de Dio. Ni preĝu, ni sciigu al Dio niajn petojn, kaj Li respondos, ĉar Li zorgas pri ni.

La Sinjoro plenigu vin per ĉiaj benoj.

# Korekto

en Dia Regno numero 2/2007

Kun granda bedaŭro mi konstatis, kiam la antaŭa numero de Dia Regno alvenis en mian poŝtkeston, ke iel la nomo de Tom Neil, Skotlando, elfalis el la artikolo *Amoj laŭ C. S. Lewis*. La artikolo, kiun verkis Tom Neil, donis al mi multe da ĝojo, ĉar C. S. Lewis estas unu el miaj plej ŝatataj kristanaj verkistoj.Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne trovis liajn librojn tradukitaj. /Redaktoro

## Laŭlanda listo de la aliĝintoj

Al la ekumena kongreso en Pelplin Pollando

**––––––––––– Belgio**
**049. KNAUER** Prof. Peter SJ
**––––––––––– Ĉeĥio**
**003. BIRKELBACH** s-ino Ilona
**017. BLAHUŠ** j-o Marek
**159. DOHNÁLEK** Petr Adam
**153. FLÍDR** s-ro Josef
**042. HAMAJDOVÁ** s-ino Jaroslava
**061. ILKOVÁ** s-ino Hana
**050. KALNÝ** s-ro Inĝ. Jan
**117. KOVÀŘ** sro Jan
**152. MATÝSKOVÁ** s-ino Jaromíra
**033. POLNICKÝ** s-ro Pavel
**019. STUDENÝ**, s-ro Jiří
**020. STUDENÁ** s-ino Pavla
**021. STUDENÝ** j-lo Jiří
**022. STUDENÁ** j-ino Pavla
**023. STUDENÝ** j-lo Vojtěch
**001. ŠVÁČEK** s-ro Miloslav
**038. VENCL** s-ro Inĝ.
**––––––––––– Danio**
**040. RYBARCZYK** s-ro Eugeniusz
**––––––––––– Francio**
**127. ABADA-SIMON** s-ino Michale
**154. CHEVALIER** s-ro Daniel
**155. CHEVALIER** s-ino Marie-Thérèse
**041. COUSSON** s-ro Philippe
**039. DEPECKER** s-ino Tereza
**186. GAILLARD** s-ro Samuel
**189. HUG** j-ino Salomé
**165. MASALA** s-ro Bruno
**166. MASALA** s-ino Anne
**167. MASALA** infano Elisabeth.
**168. MASALA** infano François J. E.
**––––––––––– Germanio**
**092. CZIRN-TERPITZ** s-ino Helga
**014. DISCHER** s-ino Erika
**161. EDER** s-ro Alois
**011. EICHKORN** sac. Bernhard
**164. GLEITSMANN** s-ino Ingrid
**037. KRÜGER** s-ro Siegfried
**085. LEWANDERSKA-QUEDNAU** Alicja
**147. MICHEL** Rymond
**148. MICHEL** Gisela
**024. MOSER** s-ro Hans
**073. NOSKE** s-ro Dr. Gottfried
**018. RATZINGER** j-o Dominik.
**093. SCHAEFER** s-ro Karl Heinz
**114. STROINSKI**, s-ro Hieronimus
**115. STROINSKI**, s-ino Monika
**––––––––––– Hungario**
**035. BALCZER** s-ro Johano
**025. KIRSCH** diakono Inĝ. János
**026. KIRSCH-ROJIK** s-ino Ágota
**027. KIRSCH** infano János Márk
**028. KIRSCH** j-o Márton Áron
**029. KIRSCH** infano Katalin Zsófia
**030. KIRSCH** infano Péter Kristóf
**031. KIRSCH** j-ino Veronika Ágota
**010. KÓBOR** sac. Lajos
**009. KÖSZEGVÁRI** j-ino Katalin
**150. SZÉP** sac. Attila
**––––––––––– Italio**
**007. BOSCHIN** s-ro Serio
**118. DAMINELLI** s-ro Giovanni
**111. LORENZON** j-o Francesco
**110. LORENZON** s-ino Loreno
**119. SOROSINA** s-ro Felice
**––––––––––– Kroatio**
**002. BELOŠEVIĆ**s-ino Marija
**––––––––––– Litovio**
**132. BIELOVIENE** s-ino Nijole
**134. GRIKPEDIS** s-ro Adomas M.
**135. GRIKPEDIENE** s-ino Viktorija
**140. JANUSKEVICIENE** s-ino Regina
**137. KERSYTE** s-ino Emilia
**158. LAICONAS** pastro Erikas
**136. LUKOSEVICIENE** s-ino Palmira
**142. NARBUTIENE** s-ino Ludmila
**138. NOVIKOVA** s-ino Eugenija
**139. RAILIENE** s-ino Janina
**133. SUKIENE** s-ino Irena
**131. PUODZIUNAS** sac. Jonas
**130. PUSINATIS** sac.Gvidas
**128. PILIPONIS** s-ro Alginantas
**141. STATKUVIENE** s-ino Danute
**129. VAICIULIONIS** sac. Lionginas
**––––––––––– Nederlando**
**044. DERCKS** s-ino Gerda
**151. VAN DIJK-KUPERIUS** s-ino Els
**––––––––––– Pollando**
**109. BĄGORSKA** s-ino Jolanta
**156. BAŃKOWSKA-POPTIE** s-ino Janina
**045. BARAŃSKA** s-ino Zofia
**036. BORKOWSKI** s-ro Henryk
**070. BORKOWSKA** s-ino Kazimiera
**075. BOLEK** s-ino Maria
**163. CZARNECKA** s-ino Jadwiga
**116. CYBULSKI** s-ro Antoni
**060. CZUPKAŁŁO** s-ro Zbigniew
**059. DUDA** s-ro Zbigniew
**160. FORYCKI** sac. Roman

**076. GAŁAS** s-ino Genowefa
**063. GIERCARZ** s-ino Urszula
**016. GMYREK** sac. Roman
**054. GRABOWSKA** s-ino Eugenia
**162. GUTKOWSKA** s-ino Maria
**163. CZARNECKA** s-ino Jadwiga
**062. HARĘŻLAK** s-ino Elżbieta
**172. KRÓL** s-ro Stanisław
**057. KOŁPANOWICZ** s-ino Anna
**078. KAŻMIERCZAK** s-ino Zdzisława
**056. KOZEK** s-ino Krystyna
**013. KOZYRA** s-ro Edward
**079. KUBICKA** s-ino Mirosława
**064. KUREK** s-ro Leonard
**065. KUREK** s-ino Agnieszka
**032. ŁABA** s-ro Marian
**126. LATACZ** s-ino Helena
**125. ŁEGOWSKI** s-ro Leszek
**086. ŁOKUCIEWSKA** s-ino Elwira
**110. LORENZON** s-ro Loreno
**048. MACINSKA** s-ino Krystyna
**047. MASIERA** s-ino Marianna
**004. MASTALIŃSKA-PYDA** s-ino Maria
**068. MAZUR** s-ino Mirosława
**067. MOŻUCH** s-ro Marain
**077. NOWAK** s-ino Jadwiga
**084. PŁACHTA** sac. Stanisław
**074. PŁATEK** sac. Stanisław
**171. POCHANKE** s-ino Barbara
**121. PODBIELSKI** j-lo (11) Kacper:
**120. POMORSKA** s-ino Teresa
**157. POPTIE** s-ro Johan
**081. PROSTACKA** s-ino Ada
**071. RUMIŃSKA** s-ino Władysława
**080. SACHA** s-ino Alicja
**055. SIWOŃ** s-ino Kazimiera
**173. SKOCZYPIEC** j-o Damian
**083. ŚLIWIŃSKA** s-ino Stanisława
**169. SMISTEK** s-ino Zofia
**043. SOBOL** s-ro Bogusław
**170. STOLZ** sac. Stanisław Piotr
**058. SULKOWSKA** s-ino Barbara
**082. SZOSTAK** s-ro Stanisław
**051. SZRAIBER** s-ino Helena
**124. SZUMIGAJ** s-ino Henryka
**053. WAŃCZYK** s-ino Roma
**112. WASILEWSKI** s-ro Bohdan
**012. WASIUK** s-ino Jadviga
**069. WILCZYŃSKI** s-ro Ireneusz
**046. WNUK** s-ino Mirosława
**122. ZDROJEWSKA** s-ino Regina
**052. ZDRZALIK** s-ino Maria
**113. ZMITROWICZ** s-ino Krystyna
**123. ZWIEJKOWSKA** s-ino Dorota

**––––––––––– Rumanio**

**146. BIRTA** s-ro Sabolciu
**181. CIMPEAN** s-ro Ioan
**180. CIMPEAN** j-o Sebastian
**175. DUJULEASA** j-ino Catalina
**183. ENACHE** s-ino Florentina
**143. LASLO** s-ino Maria
**185. NEAMTU** s-ino Kornelia
**174. POPA** s-ino Floarea
**177. POPESCU** j-ino Stefania
**178. PURCARESCU** j-ino Anca
**176. PURCARESCU** j-o George
**144. SCURTU** s-ro Gavril
**145. SCURTU** s-ino Terezia
**182. SERWAN** s-ino Floarea
**184. UTA** s-ro Ioan
**179. VARTOSU** j-o Cristan

**––––––––––– Ruslando**

**187. GORECKA** s-ino Halina
**188. KORJXENKOW** s-ro Aleksje

**––––––––––– Slovakio**

**034. BELÁŇOVÁ** s-ino Mária
**015. KEPENCAY** s-ro Ing. Tibor
**005. KOMLOŠIOVÀ** s-ino Alica
**008. PETRÍK** s-ro Pavol
**006. TOMAŠOVIČOVÁ** s-ino Mária

**––––––––––– Svedio**

**066. AHLRÉN** s-ro Åke
**072. LUNDKVIST** s-ro Arne

**––––––––––– Svislando**

**171. POCHANKE** s-ino Barbara
**087. SANDOZ** s-ro Andre

**––––––––––– Ukraino**

**103. DOROWENKO** j-ino Halina
**099. DUDKA** j-ino Julia
**100. HRYWXENKO** s-ino Natala
**098. HULA** j-ino Nastja
**104. KUXERJAVA** j-ino Katerina
**097. MÁOVYK** j-ino Oleksandra
**096. NOVAKIVJSKA** j-ino Ninel
**088. POTICJKA** s-ino Lesja
**089. PRUDKO** sac. Serhij
**106. PRUDKO** s-ino Lilija
**108. PRUDKO** j-ino Antonina
**107. PRUDKO** j-o Taras
**095. PRYNJOVA** j-ino Olga
**101. SARANXUK** j-ino Katerina
**105. SARANXUK** j-ino Marija
**094. TYMOWENKO** j-ino Jaroslava.
**102. WEVXENKO** j-ino Natala

# Blinda sveda sciencisto doktoriĝis en la fako religio historia

Tradukis el la sveda: Mats LANDFORS, SE

En la jaro 2006 la 39-jaraĝa sveda sciencisto Jörgen Magnusson doktoriĝis je la fako religio historia en Uppsala. Dank' al sia legilo "optakono" (angle: optacon), li sukcesis interpreti antikvan religian dokumenton, kiun oni trovis en Egiptio en la jaro 1945. La dokumento estas skribita en la kopta lingvo, parolita (kaj ankoraŭ parolata) de kristana loĝantaro en Egiptio.

Jörgen Magnusson kiel ankaŭ aliaj esploristoj havis certajn malfacilaĵojn ĝuste interpreti la tekston. Ĝi estas skribita en tre komplika formo de la kopta lingvo kaj estas verŝajne traduko de retorike avancita greka teksto.

Alia malfacilaĵo estis bone kompreni la mondon de pensoj, kiu troviĝas malantaŭ la teksto.

Sen la optakono Jörgen Magnusson ne estus povinte daŭrigi ĝis la fino siajn studojn. La optakono estas porblindula legilo inventita antaŭ proksimume tridek jaroj. Per unu mano oni movas etan legokameron super la papero, kaj oni metas fingron de la alia mano sur eta fingroforma plato; etaj vibriloj kreas senteblan, reliefsimilan formon de tio kion vidas la kamero.

Jen kelkaj citaĵoj de intervjuo kun sinjoro Magnusson.

**Intervjuanto**: Vi certe faris enorman laboron antaŭ la doktoriĝo.

**Magnusson**: Sabatoj kaj dimanĉoj ne ekzistis en mia mondo.

I.: Kion vi faros estontece?

M.: Oni diras ke mi devus studi oldpersajn lingvojn kaj sanskriton. Nur malmultaj personoj scias tiujn lingvojn. Sed do mi devas lerni aliajn alfabetojn. Mi volas instrui kaj daŭrigi miajn esplorojn. Kelkaj eksterlandaj universitatoj demandis min, ĉu mi volus veni al ili. Sed tio estas ankaŭ familia demando. Mia edzino studas en Uppsala, kaj do mi eble ne volas labori eksterlande.

I.: Kion vi faras dum via libertempo, se vi tian havas?

M.: Mi ĉiam estis sindonema ŝakludanto. Dum la 1980-aj jaroj mi estis kvarobla junula mondĉampiono por nevidantoj.

## Faktoj

Jörgen Magnusson faris novan malkovron. En sia disertacio "rethinking the gospel of truth" = reinterpretado de la evangelio de la vero) li inter alie trovis pli frue nekonatajn diskutojn inter la kristanoj kiuj apartenis al la gnostikuloj dum la dua jarcento en Romio. La gnostikuloj opiniis, ke la savo estus atingebla per tio ke la homoj havigas al si scion kaj liberigas sin de la materia ekzisto.

Jörgen Magnusson tiras siajn konkludojn post studado de la gnostika skribo: “La evangelio de la vero”, kiun oni trovis en dokumentaro en la jaro 1945 apud la egipta urbo Naq Hammadi.

En la fino de la 170-aj jaroj la eklezia patro Irenaeus avertis kontraŭ la tielnomata evangelio de la vero, kiun uzis grupo ĉirkaŭ la gnostika instruisto Valentinus de Alexandria.

La gnostikuloj opiniis, ke la mesaĝo kiun Jesuo peris, ankaŭ havis pli profundan signifon ol tio kion oni unue povis kredi. Temis pri tio ke la homoj fakte devenis de Dio, kiu staris alte super la ofte venĝema kaj kaprica dio de la malnova testamento.

Kompreninte sian spiritan devenon kaj ke oni ne apartenis al la kreita mondo, la gnostikuloj povis atingi savigan konon, kiun oni nomis "gnosis", greka vorto por kono, scio.

Kiam la katolika eklezio aliancis sin kun la Romia ŝtato, oni komencis detrui nedeziritajn kristanajn tekstojn kaj persekuti kristanojn kun diferencaj opinioj. Ankaŭ la evangelio de la vero malaperis.

Per detalaj studoj de la teksto uzante modernajn lingvistikajn teoriojn Jörgen Magnusson montras, ke certaj malklarecoj povas esti klarigitaj pro influoj de nordegipta dialekto.

Studante aliajn Valentinajn tekstojn oni certe povos trovi aliajn temojn, kiuj estis gravaj por la valentinanoj, sed kiujn oni malofte pridiskutis, ĉar la agendo de la ekleziaj patroj daŭrigis direkti niajn demandojn al la teksto.

Rimarko de la tradukinto: La firmao kiu konstruis la optakonon laŭ mia scio ne plu ekzistas.

Materialo el artikolo publikigita en la sveda brajlorevuo *Perspektiv*.

---

## La fiŝo kiel kristana simbolo

Siegfried Krüger, DE

La fiŝo, greke IXΘYZ (Ichthys) estas kristana simbolo, kiu jam estis uzita de la prakristanoj, eble ankaŭ kiel ekkonilo aŭ sekreta signo. Unu persono desegnis arkon en la sablon kaj alia kompletigis la simbolon per la ĉirkaŭarko kaj montris sin per tio kiel frato aŭ fratino en Kristo. Hodiaŭ oni uzas ĝin ankaŭ kiel etikedo sur aŭtomobilo.




Ankaŭ la "Ekleziaj tagoj" de la protestana eklezio en Kolonjo (la 6-an ĝis 10-a de junio 2007) uzas la simbolon.

| | | |
|---|---|---|
| Ιησόις | Iēsoûs | "Jesuo" |
| Χριστός | ΧΡΙΣΤΟΣ Christós | "la Mesio" |
| Θεοὺ | Theoû | "de Dio" |
| Υιός | HYiós | "Filo" |
| Σωτήρας | Sōtér | "Savanto" |

## Financa Raporto de KELI 2006 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | | Bilancoj fine de la jaroj 2005 | 2006 |
|---|---|---|---|
| **Aktivoj** | PB-Ĝiro (PB = Postbank NL) | 1.958,75 | 1.962,68 |
| | PB-Rentemeerrekening (2,7%) | 32.278,07 | 31.546,74 |
| | UEA-konto kelk-p | 2.354,28 | 1.321,82 |
| | Kasista kaso | 39,15 | 26,51 |
| | E-Misio, Laiconas | 288,80 | 190,72 |
| | Pavel Polnický | 0,00 | 195,00 |
| | *Monrimedoj* | *36.919,05* | *35.243,47* |
| | Kuranta konto K. Leja | 1.497,61 | 0,00 |
| | Postulo el librovendado | 110,00 | 2.324,47 |
| | Stokoj (libroj) | 2.018,38 | 6.821,79 |
| | E-Misio, Kasedoj D.K. | 211,70 | 211,70 |
| | *Provizo* | *3.837,69* | *9.357,96* |
| | Transitaĵoj | 371,29 | 0,00 |
| | **Aktivoj sume** | **40.756,74** | **44.601,43** |
| **Pasivoj** | Kapitalo | 5.528,02 | 7.485,61 |
| | Saldoj negativa/pozitiva | **1.142,59** | **789,51** |
| | *Kapitalo entute* | *6.670,61* | *8.275,12* |
| | Dumvivaj membroj | 2.573,82 | 2.208,70 |
| | E-Misio | 8.283,15 | 8.097,94 |
| | Helpa kaso | 2.693,37 | 2.913,37 |
| | Junulara helpa kaso | 337,45 | 337,45 |
| | Kongresa rezerva kaso | 1.806,51 | 1.707,18 |
| | Literatura/Himnara kaso | 12.038,77 | 13.038,77 |
| | Informada/Varbada kaso | 214,72 | 214,72 |
| | Legaco C.P.W. | 2.268,90 | 2268,90 |
| | Legaco E.t.O.-W. | 2.268,90 | 2.268,90 |
| | Legaco Boven | 0,00 | 1.865,00 |
| | *Fondusoj entute* | *32.485,59* | *35,220,93* |
| | Pasivo | 629,96 | 122,00 |
| | Kreditoroj | 450,58 | 450,58 |
| | Transitaĵoj | 520,00 | 532,80 |
| | *Pasivoj* | *1.600,54* | *1.105,38* |
| | **Pasivoj sume** | **40.756,74** | **44.601,43** |

## Rezulto 2006 kaj buĝetoj 2006, 2007 kaj 2008 (Ĉiuj sumoj en EUR)

| | Buĝeto 2006 | Rezulto 2006 | Buĝeto 2007 | Buĝeto 2008 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| Presisto kaj sendado de DR | 2.700 | 2.869,00 | 2.950 | 3.000 |
| Perantoj | 20 | 20,00 | 20 | 20 |
| *Revukostoj* | *2.720* | *2.889,00* | *2.970* | *3.020* |
| Prezidanto | 20 | 0,00 | 20 | 20 |
| Sekretario | 100 | 65,54 | 80 | 80 |
| Redaktoro | 250 | 250,00 | 250 | 250 |
| Kasisto/Matrikulisto | 50 | 54,71 | 60 | 60 |
| *Estrarkostoj* | *420* | *370,25* | *420* | *420* |
| UEA-kotizo | 55 | 56,00 | 60 | 60 |
| Ĉambro de Komerco | 30 | 22,61 | 30 | 30 |
| Kaskontrolo | 50 | 52,60 | 40 | 50 |
| Bankkostoj | 45 | 36,07 | 40 | 40 |
| Merituloj | 20 | 25,00 | 25 | 25 |
| UK Lukostoj | 140 | 80,00 | 80 | 80 |
| *Ĝeneralaj kostoj* | *340* | *272,28* | *275* | *285* |
| Librovendado (kostoj) | 1.000 | 2.828,99 | 500 | 500 |
| Varbado (Inf./varba kaso) | 50 | 0,00 | 30 | 30 |
| Rabatoj de Perantoj | 25 | 7,20 | 20 | 20 |
| *Aliaj elspezoj* | 1.075 | *2.836,19* | *550* | *550* |
| **Elspezoj entute** | **4.555** | **6.367,72** | **4.215** | **4.275** |
| **Enspezoj** | | | | |
| Kotizoj/Abonoj | 2.900 | 2.779,64 | 2.800 | 2.700 |
| Kotiz- kaj kursdiferencoj | 10 | -0,71 | -10 | -10 |
| Adopta Kaso | 500 | 629,73 | 450 | 400 |
| *Kotizoj entute* | *3.410* | *3.408,66* | *3.240* | *3.090* |
| Librovendado | 1.200 | 3.001,47 | 700 | 700 |
| Rentumoj | 500 | 747,10 | 700 | 700 |
| Profito el kongreso | 100 | (1315,00) | 0 | 0 |
| *Aliaj enspezoj* | *1.800* | *3.748,57* | *1.400* | *1.400* |
| **Enspezoj entute** | **5.210** | **7.157,23** | **4.640** | **4.490** |
| **Saldoj** | **655** | **789,51** | **425** | **215** |

## Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2006-12-31

**Aktivoj**

| | |
|---|---|
| Pavel Polnický, CZ | Dia Regno estas nun presita en Ĉeĥio kaj Pavel P. prizorgas la financajn aferojn kaj la sendadon. Pro tio ni gvidas propran konton |
| Konto K.Leja: | repagis la krediton kaj ni nuligis la konton |
| Stokoj: | Sanktaj Biblioj (6), Biblio nova NL (34), Biblio nova PL (40), Biblio 06 (703), Novaj Testamentoj broŝ. (73), Novaj Testamentoj bind. (27), Evangelioj laŭ Johano (237), Adoru Kantante (9), Nia historio (6), Esperante kaj Ekumene (7), Adoru (16). La libroj estas parte stokataj ĉe Els van Dijk (NL) kaj J. Tuinder (NL). La plej grandan parton de la Biblioj stokas por ni B. Eichkorn (DE). |
| E-Misio kasedoj: | Dimanĉa koncerto (73). La vendontoj estas petataj kontakti la kasiston. |
| Postulo: | B. Eichkorn (IKUE) kaj KELI financis 2006 la noveldonon de la Biblio. Kvanto 4000 ekz., 1000 financis KELI (sume 7630 EUR). Je la fino de la jaro estis venditaj 1187 ekz. Laŭ interkonsento B. Eichkorn stokas la Bibliojn kaj la profito estas dividita 4:1. El tio rezultas la postulo de 2324,47 EUR, kiu jam estas pagita. |

**Pasivoj**

| | | |
|---|---|---|
| Kapitalo: | Estas la libera kapitalo, alian vidu sub Fondusoj (kursivitaj sube) | |
| Saldo pozitiva: | 789,51 EUR | |
| Fondusoj | *Helpa kaso:* Estas por helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson. Donacoj de Nel v. Iperen (300).<br>*E-misio:* Ni elspezis transportkostojn por donacitaj NT kaj subtenis E. Laiconas vojaĝi por diservado esperantlingva<br>Literatura Kaso: Ni havis enspezojn el vendado de Novaj Testamentoj.<br>Kongresa reserva Kaso: Ni pagis donacojn por la LKK en Ĉeĥio kaj antaŭkongresan estrarkunsidon.<br>Legaco Boven el NL kun 1865 EUR estas nova. | |
| Kreditoroj: | Hungara kaso (Iren Bagi) | 355,33 EUR |
| | Brita kaso (Diana Richardson) | 95,25 EUR |
| Pasivoj: | Sekretariaj elspezoj | 122,00 EUR |
| Transitaĵo: | Antaŭricevitaj kotizoj | 532,80 EUR |

## Klarigoj pri la rezulto 2005 kaj la buĝetoj 2006/2007

Kotizoj pagendaj de

| | | | |
|---|---|---|---|
| Membroj individuaj ......................139 | (142) | Nuraj abonantoj ... 24 | (28) |
| Membroj familianaj .........................10 | (10) | IKUE-abonantoj ... 23 | (23) |
| Membroj subtenantaj .......................3 | (2) | 47 | (51) |
| Membroj dumvivaj ........................21 | (21) | | |
| Membroj adoptitaj ......................129 | (124) | | |
| .....................302 | (299) (antaŭa jaro) | | |

Stagnas la membraro, kvankam estas aliĝoj, sed estis ankaŭ 9 mortintoj. En la kategorio "Membroj adoptitaj" ni havas novajn membrojn en Afriko. En Hungario 5 nun pagas la plenan kotizon.

**Librovendado:** La kostoj aŭ enspezoj por librovendado influas la saldon.

**Adopta Kaso:** Mono donacita de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Estas membroj en Albanio, Afriko, Bulgario, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Hungario, Jugoslavio, Litovio, Pollando, Rumanio, Rusio. Ili estas petataj kontribui "laŭforte" (kotizo laŭ interkonsento kun la landa peranto). Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2006 enfluis 629,73 EUR

**Kotizoj** hungaraj 95, ĉeĥaj 120 EUR

**Donacoj** Brita KELI-sekcio 62, Finna 138, Nel v. Iperen, NL 200. Unuopaj membroj 14,73 EUR

Saldoj 2006, 2007 kaj 2008: Post la profita kongreso en 2006, heredaĵo, propra kompostado kaj sendado de DIA REGNO kaj nova eldonejo en Ĉeĥio nia financa bazo estas sufiĉe bona

# Tagordo por la jarkunveno de KELI 2007

1 Malfermo
2 Elekto de kunprotokolantoj
3 Fikso de la tagordo
4 Komunikoj
5 Funebra memorigo
6 Sekretaria jarraporto
7 Kasista jarraporto
8 Raporto de la kaskontrolantoj
9 Buĝetoj
10 Raporto de la redaktoro
11 Estrarelekto
12 Kongresplanoj
13 Ideoj & sugestoj de la membroj
14 Fermo

**Klarigoj:**


(11) Ĉi-jare finiĝas la deĵorperiodo de Philippe Cousson (prezidanto), Els van Dijk (sekretario), Britta Rehm, Jacques Tuinder, Samuel Gaillard. Philippe, Samuel kaj Jacques estas reelekteblaj.Britta ne. Ni dankas pro ŝia multjara laboro kiel estrarano de KELI. Els ne estas reelektebla kiel sekretario sed ŝi estas preta resti en la estraro kiel membro por trakti la necesajn leĝajn aferojn de KELI en Nederlando. Kvankam nun solviĝas la sekretaria problemo restas niaj zorgoj pri la estonteco de KELI kaj la manko de novaj estraranoj.

(12) Por la KELI-kongreso de 2008 ne anoncis sin organizantoj. La Universala Kongreso okazos en Rotterdam (19-26 julio).

---

Je la 1a de Februaro 2007 okazis la jara inventuro de la stoko de en la jaro 2006 nove eldonitaj Biblioj, ties stoko ja troviĝas ĉefe en la domo de pastro Eichkorn. Alveturis tien al Villingen/Germanujo Siegfried Krüger kaj Karl Heinz Schaeffer kaj ni kontrolis triope la stokon de ankoraŭ 2860 Biblioj el origine ĉ. 4000. Ĉio montriĝis en ordo kaj des pli bone gustis la sekvanta tagmanĝo, pri kio respondecis Erika Discher. Mi aldonas pri tiu evento fotojn, kiujn mi faris, kompreneble mi mankas sur ili kiel fotisto.

Mi kore salutas
Karl Heinz Schaeffer





# Sekretaria jarraporto pri la jaro 2006

Kompilis Els VAN DIJK, NL

Jen mia lasta sekretaria jarraporto. Estas la 26-a raporto, kiun mi faris. Dum la multaj jaroj de mia sekretaria deĵorado estis la plej impona evoluo la uzado de la interreto. La estraranoj kiuj havas komputilon uzis la elektronikan poŝton por la necesaj kontaktoj. La tuta Esperanto-movado spertis ke la interreto nuntempe estas la plej grava propagandilo de Esperanto. La plej multaj informpetoj pri KELI. atingis min per la elektronika poŝto, ekzemple el Afriko. Plurfoje mi sendis Biblion kaj kristanan materialon al tiu kontinento.

Nia membro-nombro daŭre malaltiĝas. Tiu fenomeno estas la sperto de multaj Esperanto-organizoj.

En 2006 mi prizorgis la kontaktojn kun la banko en Nederlando (Postbank) kaj la Ĉambro de Komerco kie KELI laŭleĝe estas enskribita.

Informoj pri KELI estas troveblaj sur la ttt-paĝo: www.chez.com/keli

**Dia Regno**

Dank'al la redaktoro Bengt-Olof ´radsson aperis Dia Regno 6 fojojn. Ĝi enhavis vere internaciajn kontribuojn ankaŭ el Afriko kaj Ĉinio. Vi certe rimarkas tion se vi trafoliumas ĉiujn numerojn. La tekstoj kaj la fotoj estas bonkvalitaj.

**Britio**

Tom Neil dissendis kaj redaktis 3 fojojn jare "Kristana Alvoko-n". Laste en septembro. Ne anoncis sin posteulo do la septembra-numero estis la plej lasta. La jarkunveno de la sekcio okazis en Scarborough en la kadro de la 87-a Brita Kongreso de Esperanto, de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo.

**Finnlando**

Olavi Kantele verkis kaj forsendis "Cirkuleron". La sekcio denove gvidis matenpreĝojn kadre de la Printempaj kaj Aŭtunaj Tagoj de la Esperanto-Asocio de Finnlando. Dum la Aŭtunaj Tagoj okazis la jarkunveno de la KELI-sekcio.

**Germanio**

Dum la 83-a Germana Esperanto-Kongreso okazis Ekumena Diservo je la unua tago de Pentekosto en Braunschweig (vidu DR 4/2006). Celebris pastoro Peter Bäs kaj pastro Albrecht Kronenberger. Dum la sama semajnfina kongreso mi partoprenis la jarkunvenon de la germana sekcio de KELI. Gvidis ĝin la prezidanto Wolfram Rohloff.

Regule okazis Ekumenaj Diservoj en Stuttgart kaj Speyer.

**Hungario**

Aktivas kelkaj membroj grandparte en

Budapesto. Éva Farkas gvidis denove kunvenojn en la ĉefurbo en kiuj ĉiuj esperantistoj estis bonvenaj.

**Litovio**
Pastoro Erikas Laiconas gvidis Ekumenan Diservon je la 4-a de julio okaze de la 42-aj Baltlandaj Esperanto-Tagoj en Estonio (vidu DR 4/2006).

**Nederlando**
Ankaŭ nia membro-nombro malkreskas. Multaj junaj homoj lernis Esperanton per la interreto sed ili ne plu volas membriĝi al iu ajn asocio.

En la plej nova eldono de la Biblio ankaŭ aperis la Duakanonaj Libroj en la traduko de Gerrit Berveling.

**Rusio**
Larisa Kuzmenko estas jam dum multaj jaroj nia reprezentantino por Rusio, Bjelorusio, Ukrainio, Kazaĥio. Dum la tradicia Urala renkontiĝo kiu okazis en la urbo Tobolsko vizitis kelkaj kristanaj esperantistoj vizitindajn lokojn ligitaj kun la historio de la praslava (ortodoksa) Eklezio. La plej multaj kristanaj esperantistoj havas nur per-leterajn kontaktojn. La vojaĝkostoj estas tro altaj. La membroj de la grupo de Larisa helpis laŭ povoj malriĉulojn.

**Usono**
Jerald Veit eldonis "Kalendaro de Bibliaj Tekstoj".

Lia ttt-paĝo kun bibliaj tekstoj estas vizitinda:
www.geocities.com/jeraldveit/
Interesa estas ankaŭ la ttt-paĝo de Ros'Haruro:
www.geocities.com/cigneto/pretaj.html

Ĝi montras kaj aŭdigas kristanajn kantojn kun muziko, ne nur en Esperanto.

**Ĉeĥio**
Pavel Polnický denove organizis KELI-kongreson en sia lando helpe de sia frato Tomáŝ kaj Václav Pospiŝil (vidu DR 4 kaj 6/2006). Pavel estis denove la dissendanto de Dia Regno kaj li estas la kontaktpersono kun la presejo.

Laste: la redaktoro kaj sekretario petas vin sendi sciindaĵoj al ni.

*Els van Dijk-Kuperus*

Estraro de K.E.L.I.

| | | |
|---|---|---|
| prezidanto: | Philippe Cousson | (2007) |
| kasisto: | Siegfried Krüger | (2008) |
| sekretario: | Els van Dijk | (2007) |
| redaktoro: | Bengt Olof Åradsson | (2009) |
| membroj: | Pavel Polnický | (2008) |
| | Britta Rehm | (2007) |
| | Jacques Tuinder | (2007) |
| | Irén Bagi | (2009) |
| | Zoltán Somhegyi | (2009) |
| | Samuel Gaillard | (2007) |

(inter krampoj la fino de ĉies deĵorperiodo)

# Pri esperanto-muzeo en Vieno, Aŭstrio

Karaj samideanoj, Jen ni havas tre bonajn novaĵojn por la kulturo de Esperanto. Fakte la oficiala rekono de Esperanto en Aŭstrio estas pro la laboro de la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por planlingvoj (Aŭstria Nacia Biblioteko) sur tre alta nivelo: Ree kaj ree Esperanto estas pritraktita en oficialaj kadroj kiel serioza afero. Ĉifoje ni povas anonci novajn servojn, kiuj certe estos utilaj al multaj esperantistoj. Pro tio ni petas publikigi la sekvan artikolon kaj disvastigi ĝian enhavon inter la esperantistoj.

Herbert Mayer
Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien, Aŭstrio

## Jam mil Esperanto-fotoj en Bildarchiv Austria

La Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko lanĉis kunlaboron kun la Bildarchiv Austria kaj komencis katalogigi kaj skani siajn 30.000 fotojn kaj 10.000 aliajn objektojn kun Esperanta temo. Ĵus eniris tiun daten-bankon la mila foto, la unuaj objektoj sekvos en la venontaj semajnoj.

Kion tio signifas? Tio signifas, ke ekde nun tiuj skanaĵoj estas alireblaj kaj videblaj en interreto. En la sekvaj jaroj enlaboriĝos ĉiuj fotoj, aliaj bildobjektoj kaj Esperantaĵoj en la posedo de la Esperantomuzeo: desegnoj, pentraĵoj, afiŝoj, poŝtkartoj, bildkartoj, poŝtmarkoj, insignoj, steloj, ŝildoj kun Esperanta surskribo...

Tiel la mondskale plej granda arkivo kun Esperanto-bildoj kaj -objektoj estas je la dispono de ĉiuj. Eblas ankaŭ deŝuti la skanaĵojn tute senkoste en meza kvalito kaj kun ioma krompago en altega kvalito. Tio estas granda oferto ne nur por la diversaj Esperanto-revuoj, kiuj serĉas historiajn bildojn, sed ankaŭ por sciencistoj, kolektantoj kaj la simpla samideano.

La priskriba lingvo de la Bildarchiv Austria estas la germana. Eblas serĉi per la vorto *Esperanto* kaj aldona vorto: Ekzemple per la serĉvortoj *Esperanto* kaj *Wien* vi ricevas bildojn de Esperanto-okazaĵoj en Vieno. Aranĝojn oni povas trovi ankaŭ laŭ la Esperanta nomo: *universala* ekz. kondukos vin al ĉiuj fotoj de la Universalaj Kongresoj.

La Bildarchiv Austria organizas ankaŭ malgrandajn virtualajn ekspoziciojn. Ĵus enretiĝis la unua:

**Esperanto zwischen 1918 und 1938** (Esperanto inter 1918 kaj 1938) kun kompreneble emfazo de Aŭstrio. Pro la fakto ke Bildarchiv Austria estas unu el la plej grandaj bild-daten-bankoj en Eŭropo, tiuj ekspozicioj pri Esperanto havos ankaŭ tre gravan varban efikon.

**Alvoko:** Gesamideanoj, garantiu, ke viaj historiaj Esperanto-fotoj kaj -dokumentoj ne perdiĝu! Sendu ilin al la Esperantomuzeo, kiu dece kaj konvene konservos ilin por futuraj generacioj.

Jen la adreso:

Esperantomuzeo, Nationalbibliothek
Postfach 308
A-1015 WIEN / Vieno

La retadreso de Bildarchiv Austria: http://www.bildarchivaustria.at/default.aspx


La retadreso de la Esperantomuzeo: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/eo/index.htm

---

# La bapto – simbolo de unueco

Siegfried KRÜGER, DE

La reciproka agnosko de la bapto inter eklezioj estas unu el la plej gravaj celoj de la ekumeno. En Germanio okazis en Magdeburg (29.4.2007) subskribo de tiurilata interkonsento, en kiu estas deklarita: La bapto en Kristo estas voko al la eklezioj, por venki iliajn apartiĝojn kaj por manifesti videble ilian komunecon.



La interkonsenton preparis la instancoj de la protestanta kaj katolika eklezioj*), al kiu aliĝis 9 eklezioj, inter ili la ortodoksa, la anglikana, la metodista, la malnovkatolika kaj aliaj liberaj eklezioj. Mankas ankoraŭ eklezioj, kiuj malaprobas la bapton de suĉinfanoj. Kun ili oni provas proksimiĝon.

La nova reguligo koncernas 30 milionojn da kristanoj. La bapto estas laŭ kristana kompreno ritualo (sakramento), kiu dokumentas novkomencon inter Dio kaj la homo.

*) Post la dua Vatikana Koncilio (1962-1965) unuopaj regionaj partoj de la protestanta kaj katolika eklezioj jam praktikis similajn interkonsentojn. Kiu ŝanĝis la eklezion, ne devis esti novbaptita.

# Informetoj

**Korespondpeto 1**

Pastoro John Bright Lightson Ametowanou
Asocio de Tuta Kristanoy Nova Naskighi
11 BP 314 /Telefono:(00228) 914 60 57, Lome/Togo

Bona amiko en Sinjoro Jesuo,
Mi nomiĝas John Bright Lightson Ametowanou, mi estas pastoro. Mi estas komencanto en Esperanto. Mi volas korespondi kun vi ĉar la lingvo Esperanto plaĉas al mi multe kaj mi volas ke vi helpu mi en la lingvo.

Ĝis baldaŭ – Dio benu vin.

---

**Korespondpeto 2**

Mi estas s-ro Reuben MALEZU, instruisto.
Mi havas geknaban lernejon en Muanzo urbego, Tanzanio.
Nomo kaj adreso de lernejo: *klara kaj rekta*.
Box 11701, Mwanza, Tanzania.

Oni instruas tri lingvojn; Esperanton, Sivahilan{Suahili} kaj Anglan.

RESPONDECA INSTRUISTO/ADRESO DE LA GEKORESPONDEMULOJ;
Reuben Malezu.
Box 11701, Mwanza,
Tanzania.
Aŭ E-Mail; reubenmalezu@yahoo,com;
Aŭ klarakajrekta@hotmail.com

Nun la lernejo volas helpon pro ĉi tie kaj ĉie Esperanto lingvon movadon. Bonvolu helpi al ĝi. Ni deziras komputilojn kaj printilojn [skribmaŝinojn] pro faciligi lernojn [studojn].

Mi serĉas plurajn korespondgeamikojn el ĉiu lando en aĝo inter 10 kaj 45. Temo prefere pri Edukado kaj Religio.

Gekaraj,

Por la Radio Vatikana elsendo de majo, estas nun disponebla la kompleta teksto de la 10-minuta programo (2 paĝoj): tio estas tre utila por komencantoj kaj progresantoj en Eo.

Éva Farkas-Tatár, veterana aktivulino de KELI, estas intervjuita pri ekumenismo, Adolf Burkhardt, iamaj elsendoj de Budapeŝta radio...

Rekta ligo al la slipo de la arkivo estas: http://radio-vatikana-esperanto.org/elsendo.php?d=2007-05-01

Bruno

# David Withey

1921-2006

Joan, edzino de David, petis min informi vin ke bedaŭrinde ŝia kara edzo David, estro de nia Liverpola Esperanto Rondo kaj vivdaŭra skolto, mortis pace dum sia dormo je dimanĉo, la 29-an de oktobro 2006. Li havis 85 jarojn. Eble vi scias ke lastatempe li suferis koratakon, sed ni kredis ke malrapide sed certe, lia sanstato pliboniĝus – bedaŭrinde ne. Mi multe bedaŭras ke mi devas sciigi vin pri tiu malagrabla novaĵo

Funebro okazis en la Preĝejo Sankta Maria, en Parko Waterloo, ĉirkaŭ lia domo, ĵaŭde la 2-an de novembro. Estis plenplena je almenaŭ 200 partoprenantoj - geamikoj, esperantistoj, skoltoj kaj diversaj aliaj kiuj tre bone konis lin. Li vere havis multajn ŝatokupojn kaj ĝuis grandan respekton en la komunumo. Li certe enorme multe mankos al ni.

Sincere kaj amike salutas vin

*Ian Mac Dowall*

---

# André Védrine

KELI-rondo en Lyon

Mianome kaj sendube nome de multaj antaŭuloj, mi notas ke ni ĉiuj devas saluti kadre de la generaciaj ŝanĝiĝoj la forpason de rodanalpa figuro.

Mi ne scias ĉu la bibliotekoj de niaj asocioj havas intereson al ties faroj. Bonvolu la kompetentuloj jam noti la informojn de C E R L tra S-ro Jo Catil tiel ke ne perdiĝu ĉio tio.

Iuj havas propre nenian intereson al la antaŭo (kaj tio estas rajto), aliaj daŭre opinias ke kio faritis tio estas milspecaj ŝtonoj de nia movado.

Forpasis antaŭ kelkaj monatoj alia elstarulo, tio ne kreis multajn pripensojn kiuj ligu estintecon kaj estontecon. Pro tio mi faras hodiaŭ tian specialan signon. Mi scias ke ĝi atingos nur averaĝe 250 membrojn de UFE pro la kompreneble limigita direkto de la retolisto. Tamen mi kuraĝas sugesti ke nia asocio komisiu iun ĉi-terene.

Ĝis iam, André Védrine! Ni deziru al ĉiuj pli junaj ke ili povu resti junaj, tiel longe kiel vi, favore al Esperanto.

Al via filino kaj al via edzino kaj al via familio kaj al ĉiuj geesperantistoj de via regiono, sincerajn kondolencojn el profundo de nia koro.

Ĝis!

Jean-Louis Texier

# La tiel nomata “Jesuo-preĝo”

Fonto de Estado, kiun mi renkontas en tio, kio min kortuŝas,
mi donas al Vi nomon, por ke mi havigu al vi lokon en mia vivo.
Kolektu vian lumon en mi - utiligu ĝin.
Starigu vian regnon de unueco nune.
Via sola deziro tiel agadas kune kun la nia.
Nutru nin ĉiutage per pano kaj per kompreno.
Malligu la ŝnurojn de eraroj, kiuj nin ligas kun la pasinteco,
por ke ni ankaŭ al aliaj pardonu iliajn mispaŝojn.
Ne trompu nin supraĵaj aferoj.
El Vi naskiĝas: la ĉiel-efika volo, la vivanta forto por agado,
kaj la kanto ĉion beliganta kaj renoviĝanta de jarcento al jarcento.

Vere sankta teksto estas la tiel nomata “Jesuo-preĝo”. Aliaj parolas pri “la aramea Patro Nia”. Jen vortoj, kiuj kapablas kortuŝi homojn ĝiskerne. Aramea estis la lingvo, kiun Jesuo parolis. Oni povas imagi al si, ke la aramea versio de la Jesuo-preĝo pli proksimiĝas al la originala, de Jesuo preĝita teksto ol la Patro Nia, kia ĝi venis al ni per biblia kaj eklezia tradicioj.





Dio, kiel Fonto de ĉiu Estado, laŭ tiu preĝo do ne loĝas en la ĉielo, sed en la koro de la homo. Tio esence karakterizis la gnostikan kristanismon el la pra-eklezia periodo. Kiam ni estas tuŝataj en la koro per tio, kio ĉirkaŭas nin ĉi-tere kaj ĉi-tempe – la naturo, la kosmo, la kunhomo – ni nepre intime renkontas la Mondon de Dio, kiu estas ĉie kaj ĉiam.

Ĉi tiu preĝo ĉefe emfazas la dekomencan unuecon inter Dio kaj la homo; ĝi celas konfirmi tiun unuecon aŭ ripari ĝin ĝuste tie kie ĝi estas ĉu parte ĉu tute rompita.

Jacques TUINDER, NL